

REZOLUCIO

Impresite de la regiona historio de du amasviktimaj mondmilitoj inkluzive misuzadon de kulturaj valoroj kiel scienco, edukado, amaskomunikiloj kaj juro, kaj pro la posta senfina vico de ekonomiaj kaj armaj konfliktoj, servontaj nur la financon profiton kaj strategian avantaĝon de malmultaj ekspluatantoj kaj ideologoj,

la partoprenantoj el 34 landoj el la 5 kontinentoj de la 48-a Konferenco de la Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) en Ostendo (BE) de la 17-a ĝis 25-a de julio 2015, kun la ĉeftemo: GRANDAN PACON POST LA GRANDAJ MILITOJ

PLEDAS

por plia demokratiigo kaj financa sendependigo de amaskomunikiloj, instruinstytucioj, – neŭtraligo kaj tutmondigo de la enhavo de la instrumaterialoj, – kaj de internaciaj organizaĵoj kiel Unuiĝintaj Nacioj kaj ligitaj establoj ;

SUBSTREKAS

la gravecon por la nuna kaj estontaj generacioj en la tuta mondo de stimulado de civitana engaĝigo, pcedukado kaj paca solvado de konfliktoj per edukado al respekto kaj observo de la homaj rajtoj, liberecoj, kaj demokratiaj valoroj ; kaj al ekkono kaj respekta traktado de la riĉvariaj naturo kaj kulturoj en internacia dialogo ; kaj

ALVOKAS

la kolegojn kunlabori en la kolektado de pintverkoj el ĉiuj naciaj literaturoj ankaŭ filma kaj similaj, tradukitaj aŭ resumotaj en Esperanto ;

tiuj verkoj servas al la supre menciitaj celoj nome homrajtaj, kulturinterŝanĝaj kaj medirespektaj ; kaj tiuj estu fine libroforme aŭ rete prezentitaj apoge al la Esperanto-instruado kaj al kulturaj interŝanĝoj ankaŭ ekster Esperantujo (per plua tradukado)

kaj subtene al la celoj de UNESKO.